

# KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO  
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO  
12. strato Gracia. — SABADELL  
BARCELONA-HISPANUJO

**AVIZO:** La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezono la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

**ENHAVO:** ¡Saluton! — Nia deklaro. — Bela Songó. — Flugadoj. — Mortanta ĉagreno. — En la marbordo. — Mi rakontis. — «Lumon» al Castellar. — Pensoj. — Enlanda Movado. — Eksterlanda movado. — Bibliografio. — Oficiala parto.

¡SALUTON!

**M**AJSTRO Zaménhof, kleraj kaj spertaj pioniroj de nia lingvo internacia, ĝesperantistoj, ceteraj gesamcelanoj de Hispanujo, enlandaj gesamideanoj: ĵus novnaskiĝinta familio, en Katalunlando — la lando bonvola kaj gastamema — konsistanta el geanoj diversaj, ĉiuj fervoraj, donas al vi fratan, aman ĉirkaŭprenon kaj manpremon de amikeco kaj saluto!

Vi, la eksterlandaj gazetoj, ĉefe la hispanaj, volu ankaŭ akcepti nian sinceran saluton, kaj volu cedi lokon simplan en via honorinda rondo al tiu areto malsperta, juna, kaj humila sed fervora kaj entuziasma, kiu celas, kiel vi, la venkon de Esperanto!

Al vi, «Tutmonda Espero» en nia lando la pioniro, kiu ricevis ĉiutempe nian kunhelpadon; niaj altestimataj amikoj kiuj ĉe tiu ĉi gazeto kunpartigis kun ni la klopodojn kaj penadojn de la esperanta disvastigado: akceptu nin bonvole, amike kun la estimo kaj afekcio ĝisnuna; al vi nian apartan koran saluton!

LA REDAKCIO

## NIA DEKLARACIO

**E**STAS vero, ke al nia kataluna esperanta movado mankis organizado; kaj malgraŭ tiu ĉi manko la disvastigado de nia internacia lingvo iĝis rapidege en nia lando.

Ĉu, do, nia jeso estas kontraŭdiraĵo? Tute ne, karaj gelegantoj. Tiun organizadmankon — ĉies kaj ĉie sentita — anstataŭis nia entuziasmo kaj ĉefe nia individua entrepreno kaj kuraĝo. Danko al tiu fakto Esperanto sukcesis en Katalunlando; nur danko al nia natura entrepreno nia celo efektiviĝis ĉe ni.

Sed al nia idealo baldaŭe korpigiĝinta en nia lando, mankis sperta direktilo; mankis al ĝi, tiu saĝa, lerta, klera, serena kapo kiu ĝin direktus; mankis al ĝi tiu forto deveninta de ĉia unuiĝo, de ĉia kunigado de klopodoj kaj energioj, por efike prosperigi ĝin. Estas pro tio ke ia societo okaze preninte sur sin la volon de ĝenerala enlanda societo, sukcesis multe sed ne entute, ĉar ilia unuiĝo estis nur noma sed ne vere efektiva.

Ni opinias ke la rolo de la ĝenerala societo krom unuigi devas celi efektiviĝi la rajtojn koncernantajn al ĉiuj enlandaj gesamdeanoj: liveri al ili la perojn por uzi tiujn rajtojn: kaj kunhelpi per sia klopodo la ĉefaj societoj kaj iliaj taskoj kaj celoj.

Ĝis nun, nenia societo en nia lando celis plenumi tiujn celojn naturajn ĉe la geesperantistoj, kaj estos vere bedaŭrinde ke ni plue prokrastus nian plenumontan devon kiel esperantistoj, kaj konsekvence ne agi kiel bonaj esperantistoj.

Nia tasko, ne nur estas iĝi esperantistoj kaj igi esperantistojn, sed ankaŭ unuiĝi en serioza organizado por kontribui en la progresado kaj plibonigado de ĉiujn rolojn kaj devojn sin rilatantajn al internacia lingvo.

Tiuj ĉi pensoj de longe floris en la aero ĉe ni; tiuj-ĉi sentoj de antaŭ longe batigis la koron de ĉiuj bonaj geesperantistoj katalunaj; ĉiuj plendoj celis ĉie la saman celon, kaj ĉien oni nur aŭdis «unuiĝo!». La vorto «amo», simbolo de nia kara internacia lingvo, ne iĝis plenrealeco, kaj nur anime ĝi kunigis ĉiujn.

Kial, do, oni ne penis por fariĝi vivantan tiun-ĉi senton, tiun-ĉi penson? Kial oni ne kuraĝis efektiviĝi la celon enestantan en ĉiu kataluno? Ĉar por sukcesi baldaŭe estis necesega aro da kuraĝuloj, de senlacegaj, fervoregaj entreprenantuloj, kaj ili ne estis. Estis nur areto da ili: kaj jen iam en unu loko, poste en alia,

poste kaj ĉiam ĉien, ili semas kaj semadis sian ideon; ili ĝin propagandas kaj propagandadis persiste, senhalte.

Novan fojon, ankoraŭ, dum nia pilgrimado ni kenstatis, ve! ke ĉe la esperanta kampo kreskas ankaŭ rozujoj dornhavaj, kaj ke multaj homoj, aspekte bonaj kaj aspekte bonaj esperantistoj, estis nek bonaj, nek ekzemplaj esperantistoj; en nia kampo, bedaŭrinde, la homaj pasioj kaj homaj ambicioj reĝas ankaŭ en multaj koroj anstataŭante al tiu sento natura — laŭ nia kredo — ĉe ĉia esperantisto; kaj pro tiuj ĉi ambiciuloj nia ĉies dezirata kaj necesega kuniĝo ne efektiviĝis...

Tempo pasis... Kun senlima persisteco ni laboradis. Tempo pasis, sed jen nia afero plenumita. Ĝi postulis de ni multajn fortojn, energiojn kaj penadojn, pliajn klopodojn ol ne bezonis niajn kontraŭloj por terenfaligi nian konstruaĵon. Ia vero estas ke multaj homoj plej bone taŭgas por detrui ol por konstrui.

Fiere ni diras ke nia konstruaĵo farita per la tempo estas forta kaj ĝi estos la ŝirmilo de ĉiuj eĉ de tiuj kiuj malhelpis nin kaj baris nian vojon, ĉar ni estas sindonaj kaj pardonemaj, kiel ni ĉiame estos.

Kaj ni estas tiaj, tial ke ni kredas interpreti ĝuste la internan senton de nia Zamenhofa lingvo. Nian celon per la Kataluna Esperantista Federacio ĉiuj gekatalunoj povos lerni per ĝia Regularo enhavigita en ĉi tiu sama numero. Ĝi klarigos al ĉiuj nian senton plej bone ol niaj vortoj; sed ni devas malkaŝe konfesi ke ni transcedis al la K. E. F. ĉion kio ni havis kaj valoras; ni transdonis al ĝi parton da nia propra animo kaj parton da nia propra koro.

Nune ĝi estas al vi, katalunaj geesperantistoj! Ni kune zorgu pri ĝi, kaj ĝin ni prosperigu!



## BELA SONGO

**B**RULIGITA restis la natura supraĵo de la tiel bonfarema kiel kruela somera suno: malbele flavaj la folioj de l'aleo: senkoloraj la kampoj, malgaja l'arbaro, teda la rivero: ĉio inspiris solecon. Nek kantis la najtingalo, nek ridetis la floroj, nek ĝojigis la verdaĵo. Sed feliĉe, Eolo ne dormadas; kaj subite malligas la ventojn, kiuj furioze trairas montojn kaj valojn, riverojn kaj aleojn, ŝetante la foliojn ĝis la fundo, klarigante l' atmosferon, surportante per siaj facilaj flugiloj amason ĉiufoje kreskantan da grizaj nuboj, kies terura vizaĝo pli kaj pli nigriĝas, verŝante jam

fine malsupren fruktodonajn larmojn, malgaja memoraĵo de l' es-  
tinto kaj ĝojiga espero de l' tempo alvenanta.

Vivu milfoje laŭtuna puriganto de l' aero! Vivu senfine la  
dolĉa fluidaĵo de la nuboj!

Ĉio de nun al mi ridas: freŝa l' atmosfero, beleta la sinlevanta  
tritikaĵo, karesanta la herbejo, severa la vojo, babilema la torento:  
ĉio certe anoncas novan epokon de restarigo, de gajeco, de ŝatinda  
frukto.

Novan certe, kontentigan epokon por la esperantista Katalu-  
nujo mi antaŭvidas: ĉarman, fruktoplenan fazon ni ekiras.

Federacio kataluna de esperantistoj estas rondo kataluna de  
samideanoj premantaj reciproke la manojn en konsento: estas ora  
ĉeno des pli forte ju pli ame liganta niajn korojn.

Benita do estu tiel alloga familia danco! Bonveninta, potencia  
ligilo de niaj koroj! Korsaluton al venerinda standardo sub siaj  
flugiloj ŝirmante la esperantan Katalunujon!

Sed, ĉu nia progresema kara patrujo estis ĝis hodiaŭ kampo  
senfrukta en la Zamenhofa semado? Ne, neniam. Ne nur kreskis,  
radikiĝis kaj floris la nobla semo; sed eĉ produktis neforgeseblajn  
fruktojn, kiujn vere ŝatis la tuta esperanta mondo.

Unue, nelaceblajn pionirojn, poste majstrajn stilistojn: tie,  
enpuŝantajn grupojn, tie kuraĝigajn gazetojn: lastatempe, la  
ankoraŭ bonodorantan V<sup>an</sup> Kongreson, rava elmontro de la kata-  
luna movado.

Tamen, malgraŭ la plej decidema volo, la homo laciĝis, ne  
restas firma la koro, la malfacilaĵoj lin timigas; kaj tial nia kampo  
sajnis iom dezerta; kvankam en la kataluna spirito nenio perdiĝas,  
ĉio kontraŭe multobliĝas.

Jen la dolĉa frukto el la Kongreso tirita: la naskiĝanta Fede-  
racio. Se «arbo bona ne povas produkti malbonajn fruktojn»: ankaŭ,  
la rememorinda Barcelona Kongreso naskas altvaloran  
Federacion, de ĉiuj deziratan, por ĉiuj same honoran.

Antaŭen do, katalunoj!:

«En laboro paca ne laciĝu,  
Ĝis la bela sonĝo kataluna  
Por eterna ben'efektiviĝos».

SEBASTIANO PUBILL, SKOLAPIULO.

Olot'o



FLUGADOJ

**F**ORFLUGANTE supren... ne, tute ne. Poste flugadeto ĉirkaŭ kataluna lando, mi reflugis hejmen.

Kaŝita en mia animo kiel silenta ĉambro, interne mi klopodas...

«Frateco, frateco» eliris de senkorpa brusto. Mirindaĵo! La frateco jam tegas nian patrujon, murmuretis mia lango. Farita la Kataluna Federacio, kion vi deziras, malkvieta spirito?

«Kunlaboru fervore, senlaciĝe por la tutmonda frateco» ĝi respondis.

Nune, kiel fantaziemulo, mia revo flugas, rapide flugas koron... alian... foran... fremdan koron, ĝojege kisante ĉiujn kiel amema infanulo kioma varmeco!

Feino; nia esperanta Feino, estu senmakula patrino, benu la amikaran federacion, akceptu nian homan aferon, gravan, disvastigontan, spiritan, transcendan...

Ni toastu amon, gekunfederanoj, per glaso de feliĉo, al la esperanta sukceso, en la solena unua flugado tra la sankta amikeco, ĝis mirinda disciplino, ripozante en blua ĉielo, dorlotaj per orfadeno de la suno, lulkantaj de la anĝeloj kiuj donis la dian pacon al la homoj bonvolemaj.

FLORENCJO SURROCA

Transcendemuloj...? 3-9.

MORTANTA ĈAGRENO

De l' hejm' la foresto  
min malĝojigas,  
se jam mi kantas  
mi kantas malgaje,  
se iam mi ridas  
ne per la kor'.

Ĉagren' de foresto  
kial vi staras?

kial la sorto  
nun min devigas  
de mia hejmo  
restadi for?

Sen la varmeco  
de mia lando,  
mia anim' falas  
mi ĉagreniĝas,

malvarmon sentas  
kvazaŭ de mort'.

Kial kor' mia  
ĉagrenas tiel,  
se l' aliaj koroj  
estas kiel vi?  
kial min lasas  
nune la fort'?

Ĉu vi ne sentis  
la novan varmon,  
koro la mia,  
por la Homar'?  
— Esperanto estas  
en nia sort'.

Se ni lasis hejme  
karajn gefratojn,  
ni esperantiston

ĉie renkontos  
nin kunportantan  
la plej dolĉan hor'.

Per Ĝi mi mortigos  
la hejman ĉagrenon,  
kaj kune kun ili  
mi restados frate,  
kaj ĉiuj unuvoĉe  
ni kantos en ĥor'.

Vivu Esperanto  
por nia feliĉo!  
por nia interamo  
Ĝi restu kun ni,  
Ĝi staru en nia koro  
ĝis venu la mort'!

Regu Esperanto!  
Regu en ciu kor'!

KROM

Transcendemulo? — 4-9

Januaro 1910



## EN LA MARBORDO

**P**LAĈAS al mi ripozi sur la ŝtonegoj la krurojn pendantajn super la abismo, kiun la maraj akvoj kaŝas duone, la rigardon vagantan tra la senfino kaj la animon ripozantan sur via rememoro. Vi estas malproksime, tre malproksime je mi, sed mia animo vin vokas kaj sentas vin proksima.

.....  
Ni sidiĝu unu momenton kaj poste ni daŭrigos nian promenadon. Dume ŝetu vian rigardadon sur tiun maron, kiu etendiĝas antaŭ ni. Rigardu: kiel kvieta kaj kiom bela! Ĝiaj ondoj venas, trankvilaj, kisadi la limigajn ŝtonegojn kaj ilin kisinte iĝas blanka ŝaŭmo kaj iufoje sendas al ni sian freŝecon per miloj da netuŝeblaj eroj. Ankau tiel, en la maro de l' nia vivo la ondoj estas nun kviet-

aj kaj kiam ili karesas per dolĉaj kisadoj niajn animojn, ili tuj devenas blanka kaj pura ŝaumo, kiu plenigas de la dolĉega freŝeco el la rememoroj nian spiriton. Sed ho ve! Unu tagon versaĵne, sammaniere kiel tiuj ŝtonegoj, sur kiuj ni ripozas nun, vidas la ondegojn supreniri fierege kaj fali senforte, ni vidos el la maro de l' vivo la ondojn stariĝi antaŭ ni furioze kaj aŭdos blekantan ventegon super ni. Ellernu esti kiel la ŝtonegoj firma al la maraj atakoj kaj same kiel ili, post bataladi vi vin sentos pli pura kaj pli forta ol antaŭe, ĉar estas post la ventego kiam la aero estas pli pura, la ĉielo pli blua kaj la suno pli brila.

Rigardu. Sub niaj piedoj estas profundegaĵo. Ne timu ĝin, ĉar ĉu vi estas forta vane penos por vin depreni je tiuj altaĵoj la sirenoj, kiuj de sube vokos vin. Ili por vin altiri zorgos igi vin deziranta riĉaĵojn, kiujn ili al vi promesos donaci. Malsukcesinte en siaj intencoj, ili atentos la nokton, kies horojn per sia allogaj kantoj ili intencos vin dormigi. Dormante, vi vidos en sonĝo la promesitajn belaĵojn kaj delogita ilin sekvos senkonscie al la maraj grutegoj de kie oni ne revenas plu. Estu do, kiel tiuj ŝtonegoj, forta. La sirenoj, ĉiunokte rampas sur ilin, ilin kisante per dolĉegaj karesoj, sed la ŝtonegoj estas fide je sia amo kaj kiam la sirenoj karesemaj ilin kisas ampasie, ili ne sin donas, ĉar pli amemaj, pli pasiaj estas la kisadoj de l' suno kaj de la nebuloj kaj pli delogaj estas la kantoj de l' maro ol la kisoj kaj la kantoj de la allogaj sirenoj.

Ni stariĝu kaj iru promenadi laŭ longe de la marbordo silenta. Rigardu: oni ne vidas iun promeni. El la sojloj la marlaboristoj rigardadas senmovaj la maron, same kiel ni rigardadas el nia vilaĝo senmara, senmarborda kaj senŝtonega la najbaran kamparon kaj la malproksimajn montojn. Sed kiel malsimila la vivo tie kaj tie ĉi! Ĉi tie la homoj parolas laŭt: alta la kapon, trankvila la mienon kaj per nekaŝema koro. Vi vidos parojn de geamantoj promenadi tra la dezertaj marbordoj, kiam la suno brilegas plene aŭ kiam ĝi iras morti trans la montojn; ĉi tie le geamantojn ne viglas malspritaĵoj nek mokas babilemaj vilaĝanoj. La domoj estas blankaj ĉi tie kaj la balkonoj kaj fenestroj ŝajnas rigardadi simpatie kaj la enirejoj estas malfermataj je gepatra akcepto. La stratoj ne estas unuforme liniigitaj; ili estas tordaj, ili kreskadis laŭ sia volo kaj pro tio ili estas belaj kiel la vivo mem. Tre malsame je l' nia vilaĝo kie la stratoj estas unuformaj same kiel la dogmoj kiujn oni trudis al ni je nia infaneco igante neeble al ni ĝui la ĝojon de l' vivo. Tie la domoj estas fieregaj, lukse vestitaj,

kun fenestroj post kies vitroj zorge rigardadas scivolemaj okuloj kaj kun balkonoj post kies sunevitiloj ĉiam okuloj elesploras...

Rigardu, Karulino mia. La suno kariĝas post la montojn, kiuj ĉirkaŭas nian malproksiman vilaĝon; ĝi subiras orkolorigante la maron, la ŝtonegojn kaj la marbordon. La blankaj domoj sangkoloriĝas. Ili bedaŭras profunde la mortiĝon de l' tago finiĝanta, ĉar ili ne scias certe ĉu la suno denove leviĝos morgaŭ kaj al ili sendos ĝian kareseman kidadon je amo. Ankaŭ ni ne scias pri la mistero, kiun al ni rezervas la nokto, kiu antaŭ ni eketendiĝas nun... Meze el la noktiĝa mallumo ni kidadu nun la alian kaj ĉu la morto venos kune kun la nokto morgaŭ la suno leviĝanta nin renkontos sur la ŝtonegoj de ĝi tiom amataj kaj same kiel al ili, ĝi nin kidados kaj karesos.

Paroj de geamantoj promenadas laŭlonge el la marbordo. La nokto estas ĉie. Vi, Karulino mia, vi estas malproksima, tre malproksime je mi.

A. ROBREÑO GÜELL



### MI RAKONTIS...

Mi rakontis al maro senborda  
pri la grandaj turmentoj en koro,  
kaj per bruo mallaŭta de l' ondoj  
ĝi respondis al mi kun favoro.

Mi rakontis al vento rapida,  
ke ne povas mi spiri libere;  
kaj el landoj ĝi iaj mirindaj  
al mi portis tuj freŝon aere.

Mi rakontis al verda arbaro  
de la vivo malgaja dolorojn;  
kaj en ombro ĝi tuj min dormigis,  
ŝancelante foliojn kaj florojn.

Mi rakontis al Suno varmega,  
ke mi vidas nur tagojn malklarajn;



varmigantaj kaj lumajn radiojn  
ĝi tuj sendis al mi malavarajn.

Mi rakontis al homo-kunfrato  
pri la vivo senĝoja; kaj li,  
iel strange movinte la ŝultrojn,  
tre rapide foriris de mi.

VEJNBERG



### «LUMON» AL CASTELLAR

**L**A taĝvetero helpis la deziron de ĉiu kiu intencis ĝui irante al Castellar por redoni la afablan viziton kiun faris al ni niaj amataj samideanoj el «Pacaj Batalantoj» ĝuiĝante samtempe je la vidaĵoj de la nomita belvilaĝeto.

La elirado el Tarrassa, kiu okazis ĉirkaŭ la unua kaj duono tagmeze, donis al ni specialan karakteron. ĴNu! Imagu dekduon da veturiloj, sekvante unu al alia, enhavante la respektindan kvanton da dudekkvar ekskursantinoj, kiuj altiris al si la rigardojn de la murmuremuloj kaj scivolemuloj.

Ni alvenis al Castellar je la tria horo, vekiĝante la intereson de la indiferentuloj ni atingis la etenditajn brakojn de niaj samcelanoj, kiuj nin atendis. Poste ni elveturis en la Urbdomon ĉe kies teretaĝo la grupo P. B. donas esperantan kurson; grupano el P. B. nin salutis kaj ni supreniris tuje al la ĉefa salono kie ni estis akceptitaj de la Ubkonsilantaro.

La urbkonsilanto S<sup>ro</sup>. Sampere dediĉis al ni paroladeton al kiu respondis S<sup>ro</sup>. Quintin Lopez el «Lumon» dankante la akcepton faritan al ni, kaj ankaŭ esprimante la plej varman saluton, finante la akcepton kantante ĉiuj kune, nia majesta himno «La Espero».

Poste ni vizitis la preĝejon laudesplorante la altvalorajn arĥitekturajn mirindaĵojn, kiujn ĝi enhavas, kaj ankaŭ la «Unugradaj Publikaj Lernejoj» en kiu oni jam atendis la instruistinojn, rakontante al ni la funkciado de tiuj laŭdindaj lernejoj. La ĉefinstruistino promesis al ni lerni kiel eble plej baldaŭ Esperanton, kaj instrui ĝin al la infanoj tuj kiam ŝi estos lerninta ĝin.

La socia sidejo de la grupo P. B. elbordiĝis pro granda amaso

da ĉeestantoj. S<sup>ro</sup>. Casanovas el P. B. dankis al la Terrassa'j samideanoj ilian neforgeseblan viziton kaj akceptis korege la ideon proponitan de «Lumon» organizi dum la venonta somero Esperantan feston sur unu el niaj najbaraj montoj. S<sup>ro</sup>. P. Rigola parolis pri la amo, starigante ĝustajn similaĵojn, kun Esperanto.

P<sup>ro</sup>. Marko Lliró ĵus alveninta de Sabadell, salutis la du grupojn kunvenintajn pro sama afero. S<sup>ro</sup>. Rambla, el «Lumon» dankis la afablecon liveritan al li kaj al siaj amikoj.

Finiĝis ĉi tiu festo per fratmanĝeto. Oni ekbalbutis nian himnon. Noktiĝis iam post iom. Oni organizis denove la karavanon, devore ni esprimis nian amikecon al Castellar'j kamaradoj kaj adiaŭante ilin ni ekmarŝis.

La oka eksonoris kiam la karavano trairis la ĉefpromenejo, kaj alveninte ĉe la sidejo de «Lumon» ĉiuj disiris hejmen kun rava memoro pri la eksterordinara pasinta vespero.

*Grupano el «LUMON»*



## PENSOJ

— La vivo estas ŝtuparo tra kiu la homoj fatale devas suriri, kaj pro iliaj agoj iuj suriras tre rapide, aliaj malrapide aliaj malsupren falas. Sed kion mi ja vere al vi diras estas, ke, neniu rajtas sidiĝi sur la ŝtupoj.

\* \* \*

— La grandaj jesoĵ de la homaro determinantaj la progresadon de la popoloj, estis faritaj pro tri demandoj: — kiel? — kiam? — kial? — La religioj metas ilian celon *super* ni; la scienco *antaŭe*... Nuntempe, ni marŝas...

F. DE P. BEDÓS  
Esperantigis D. S.



## ENLANDA MOVADO

Oni petas la delegitojn ke ili sendadu siajn monatajn priskribojn pri la loka esp. movado, plej mallongaj kaj legeblaj nur sur unu flanko de la papero klopodante sin okupi en ili nur pri detaloj rilatantaj al la festoj,

kursoj kaj diversaj aktoj de propagando okazantaj en la loko, en maniero raportema kaj konciza; se oni deziras *sin distri* per literatura aŭ pseŭdo-literatura skribo kvankam traktanta iun samideanan ekskurson aŭ solenon, verku ĝin aparte kun propra titolo kaj se ĝi estas publikiginda laŭ la juĝo de la Redakcio, tiu ĉi aperigos ĝin en alia loko de la gazeto. La lima dato por la sendo de la manuskriptoj estas la 15.<sup>a</sup> de ĉiu monato.

## BARCELONO

Vidinte la sukceson momente pligrandigantan de la *Kataluna Esperantista Federacio*, en la Barcelona Esperantistaro, iĝis la ideo krei la «Barcelona Esperantista Societo'n», tiel ke ĉi tiu estos por Barcelono, kio la Federacio estas por Katalunujo.

Nature, estas kelkaj cirkonstancaj diferencoj: la Federacio ne povas havi ejon: la «Barcelona Esperantista Societo» povas kaj devas havi propran ejon.

Oni intencas starigi, per ĝi, la unikan Esperantistan Societon en Barcelono (ne Sant Marti, Poble Sèch, Sarrià, k. t. p.) kaj ke ĉiu Barcelona Esperantisto estu ano de tia ĉi societo. Kompreneble, oni ne iĝos perforte malaperigi la nunekzistantajn esperantistajn grupojn, nek perforte oni iĝos ĉiun Esperantiston esti tia ano. La esperantisteco kaj la logiko ja iĝos tion esti.

Kaj ĉar tial la Barcelona Esperantistaro estos forta, kapabla, multepova, ĝi instruigos kursojn pri Esperanto, ĉe la ĉiaj ĉefaj societoj, ĉie en Barcelono, kaj tiel iĝos Esperantista fako en ĉia ĉefa Societo, ĉie en Barcelono. Jen kial estos tute troa kaj ne prava la ekzistado de senpovaj nur Esperantistaj grupetoj, kaj tiel ĉiu Barcelona esperantisto aniĝos en la «Barcelona Esperantista Societo».

Tiu ideo estas certe tiel bona kiel grava. Do estas devo de ĉiuj Barcelonaj Esperantistoj, ĝin disvastigi kaj fervore helpi tiujn, kiuj iĝos ĝiajn pionirojn. — DELF DALMAU.

## SABADELL

La entuziasmo jam tradicia de tiu ĉi urbo por la Zamenofa verko montriĝas je ĉiuj aspektoj de sia ekzisto kaj pri tio estas nebezone informi la legantojn de *Kataluna Esperantisto*, ĉar ili ne ignoras la aktojn publikajn kaj nepublikajn kiujn organizis la Sabadell'aj esperantistoj kaj neankaŭ ignoras la efikajn rezultatojn de ilia propagando kaj de la kursoj donitaj de la du ĉi-tieaj societoj, kio disjetis centojn da adeptoj tra la tuta urbo.

Sendube al tio ĉi obeas la fakto ke la dankindaj organizintoj de la amegata «K. E. F.» lokis fonde ĝian sidejon en nia urbo kaj konfidis al ni la delikatan laboron elirigi ĝian Oficialan Organon. Kiel, ajn estas, ni penos plenumi kun nia humila povo la laboron kiu estas al ni taskita, ĉar

ni estas konvinkitaj pri tio ke la afero donos da sukplenaĵoj por la kataluna esperanta vivado kaj por Esperanto.

\* \* \*

Nune, la multe konata societo «Esperanta Semo» instruas du kursojn de lingvo internacia por viroj kies lernantoj ĉeestas multenombro kaj kelkaj esperigas ke la nombro da lertaj esperantistoj jam atentinda kiun ni havas, pligrandiĝos pro ilia eniro en nian rondon. Multe sukcesas ankaŭ la kurso por virinoj kiun instruas la klera samideano S<sup>ro</sup>. A. Lagarriga el la sama societo kaj en ĝia propra sidejo, kies klasoj okazas triope ĉiun semajnon kun ĉeesto de almenaŭ dekduo da fraŭlinoj tre entuziasmaj.

La komitato de la ĵus citita grupo por la periodo 1909-1910, elektita en la lasta trimestro de la pasinta jaro, estas kiel sekvas: *prezidanto*, S<sup>ro</sup>. J. Pi-ferrer; *vic-prezidanto*, S<sup>ro</sup>. A. Costa; *sekretario*, S<sup>ro</sup>. S. Mas; *kasisto*, S<sup>ro</sup>. J. Altura; kaj *anstataŭanto*, S<sup>ro</sup>. J. Romeu.

La societo «Aplech» Esperanta Grupo, jarkomence nomis por si la sekvantan komitaton: S<sup>ro</sup>. J. Vilardell, *prezidanto*; S<sup>ro</sup>. J. Bracons, *vic-prezidanto*; S<sup>ro</sup>. J. Pavia, *sekretario*; S<sup>ro</sup>. J. Xercavins, *kasisto*; S<sup>ro</sup>. L. Busqueta, *bibliotekisto*; S<sup>ro</sup>. J. Molins, *anstataŭanto 1.<sup>a</sup>*; S<sup>ro</sup>. A. Xipell, *2.<sup>a</sup>*; S<sup>ro</sup>. M. Peig, *3.<sup>a</sup>*.

Ĝi lastatempe elcedis sian krediton al la Ĉekbanko Esperantista en Londono. — LA DELEGITO.

## TERRASSA

La esperanta movado en nia urbo pligrandiĝas dank' al la senĉesa agado de la ĵus naskita grupo «Lumon», kiu prenis sur sin la gravan aferon tute esperantigi nian amatan urbon. Jen la hodiaŭa esperantagado.

La Urbkonsilantara Moŝto, subvencias esperantan kurson ĉe la «Industriaj Lernejoj», faratan de la profesoro S<sup>ro</sup>. Johano Graells, kie ĉeestas pli ol 30 lernantoj.

Ĉe la «Escuelas Pias», niaj fervoraj samideanoj PP. Muixi, Carbonell kaj Martí instruas ne oficiale sed rajtigite de la estro de tiu ĉi laŭdinda kolegio, esperantan kurson por infanoj, kiuj jam ekbabilas nian karegan lingvon.

Kaj fine, la grupo «Lumon» daŭrigas sukcese la kvar kursojn (tri por viroj, kaj unu nur por virinoj) kiujn oni malfermis post la neforgesebla inaŭguracia festo.

«Lumon», ankaŭ organizis festeton okaze de la kvindekjara datreveno de la naskiĝo de nia Majstro. Oni legis kelkajn tradukaĵojn kaj originalaĵojn dediĉitajn al Li. S<sup>ro</sup>. E. Ferrer paroladis pri «Sienco kaj Esperanto». Li rimarkis la nepran necesecon de ia ajn komuna lingvo por helpi la dis-

vastigadon de sciencaj verkoj; li rakontis kelkajn rememorindaĵojn, inter kiuj mi citas tion kio okazis al la franca ĥimiisto Berthelot kiu, por sin informi pri la ĥimiaj eltrovaĵoj de rusa aŭtoro, estis devigita studadi tiun malfacilan lingvon. Li jesigis la baldaŭan triumfon de Esperanto, taŭga lingvo por sciencaferoj. Oni legis verkaĵon de S<sup>ro</sup>. J. Graells adekvata al tiu ĉi festo. Ptro. Muixi ankaŭ ĝin plenigis per sia favora kunhelpo.

Fine, «Lumon» aranĝis sukcesplenan ekskurson al Castellar kies specialan raporton mi faras en alia parto de ĉi tiu numero. — LA DELEGITO.

La tagon 13<sup>an</sup> de Februaro devis doni konferencon pri «Gramatikaj Generalaĵoj» en la sidejo de «Lumon» la profesoro de niaj Industriaj Lernejoj S<sup>ro</sup>. Eugeni Ferrer. Ĝi estas la unua de serio organizata de la sama grupo, traktante gramatikajn aferojn de vera utileco por la novaj esperantistoj.

## VIC

En tiu urbo Esperanto ankaŭ kreskadas ĉiutage per sia propra forto, ĉar la studemeco de la tieaj samideanoj estas tiom rimarkinda ke multaj el ili iĝis esperantistoj nur pro propra konvinkigo pri la nediskutebla sukceso de Esperanto.

De la komenco de tiu ĉi jaro niaj fervoraj samideanoj Sroj Delclòs, Albajes, Naves kaj Pujadas (oficialaj instruistoj) malfermis kursojn en diversaj lokoj el Vic.

Estas ĉarmege vidi tiujn klasojn tiom animozajn, precipe tiujn de la tri unuaj per infanoj, ĉe kiuj alestas sepdek lernantetoj cirkaŭe. Tiom mirinde kaj rapide tiuj infanoj lernas la lingvon internacian ke dank' al tiu diligenta knabaro, oni povas certigi ĉe Vic belegan estonton de Esperanto.

Dum la venonta Septembro tiu urbo solenigos la 100<sup>a</sup> datrevenon de la naskiĝo de sia glora filo la klera filozofo doktoro Jako Balmes per grava internacia Kongreso de Apologieco, kaj por tion pretigi, oni elektis diversajn komitatojn specialajn, ĉe kiuj estas ankaŭ Komitato de la lingvo Esperanto, ĉar en tiu Kongreso Ĝi estos oficiale akceptata. Tiu Komitato jam si turnos per speciala alvoko al ĉiuj esperantistoj.

La grupo «Vika Esperantistaro» elektis la 16<sup>an</sup> Januaro, novan Komitaton por la nuna jaro, jene: *Prezidanto*, S<sup>ro</sup>. J. Palmarola; *Vic-prezidanto*, S<sup>ro</sup>. E. Subirà; *Sekretariino*, F<sup>ino</sup> S. Sanvins; *sekretario*, S<sup>ro</sup>. F. N. Pujadas; *Kasisto*, S<sup>ro</sup>. J. Conill; *Voĉdonantoj*, F<sup>ino</sup> R. Cortinas & S<sup>ro</sup>. Florenco Surroca.

Tiu ĉi komitato en sia unua kunveno decidis aliĝi la Federacion Esperantistan de Katalunujo. — LA DELEGITO.

## REUS

La idealo esperantista enradikiĝis lastatempe en tiu ĉi urbo per la entuziasmiĝo de nur ok amikoj por la lernado de nia dua lingvo kies ili ĉestis kurson instruitan dum Novembro pasinta en la tiea «Centre de Lectura», de la klera esperantisto S<sup>ro</sup>. Ludoviko Coll Calvet el «Esperanta Amo» de Manlleu.

Foririnte de la rondo pro siaj okupoj la nomita S<sup>ro</sup>. Coll, la Reus-anoj tute ne forlasis sian faritan laboron, sed daŭris lernadi kaj instruadi kun fervoro la belan internacian lingvon kaj por plenumi sian devizon kiu estas «Ĉiuj esperantistoj» ili ĵus fondis esperantan grupon titolitan «Nova Semo» kiel plej efika rimedo por propagandi nian ideon tra la tuta urbo.

La estraro de «Nova Semo» estas jene: S<sup>ro</sup>. A. Clivillés, *Prezidanto*; S<sup>ro</sup>. P. Felip, *Sekretario*; S<sup>ro</sup>. F. Baró, *Kasisto*. La delegito de la Federacio al kiu la grupo unuanime aliĝis, estas S<sup>ro</sup>. Henriko Aguadé.

Resume: ke Esperanto multe progresas en Reus kiu, pro tio, fariĝos grava alportilo de la definitiva triumfo de Ĝi.

Ni esperu.

## OLOT

La sindonemo de la klera esperantisto P<sup>ro</sup>. Sebastiano Pubill, vekis la entuziasmon de la anoj de tiu ĉi urbo por la lernado de nia kara lingvo, kion pruvis la multenombra ĉeestantaro de la esperanta kurso instruita de tiu bona kondukanto, kun granda sukceso.

Malfermita la kurso, kreskis la fervoro por la lingvo Esperanto tiom, ke post ne longe la lernantoj ekbabletis esperante, kaj oni tuj fondis je iniciativo de la nomita instruinto, esperantan grupon sub la nomo «Olota Stelo».

De nelonge «Olota Stelo» havas ĉiutagan kurson, kie rimarkiĝas multaj deziroj ellerni la internacian lingvon dank' al senlaca laboro de ĝia instruanto S<sup>ro</sup>. Jozefo Pi.

Nune, estas je granda nombro tiuj kiuj en Olot, lernadas la belan lingvon, kaj ĉiutage pligrandiĝas la nombro da ĝiaj adeptoj.

Antaŭ ol komenci la diritan kurson, lernis hejme Esperanton S<sup>roj</sup>. Roca, Capdevila kaj aliaj. Ankaŭ estas rimarkinda, esperantistino monaĥino, kaj aliaj kies nomojn mi nun ne rememoras. Dank' al la du paroladoj pri Esperanto de la eminenta esperantisto S<sup>ro</sup>. Alfonso Sabadell, kaj al la persisteco, en la esperanta lernejo, de P<sup>ro</sup>. Pubill, lecionante ĉiutage la lernantojn, kaj fine al la fondo de «Olota Stelo», ĉiuj urbanoj sentas grandan amon al la internacia senmorta *Zamenhof*'a lingvo. — Josefo Pi, *delegito*.

## BALAGUER

Antaŭ ne longe, nia ĉi tiea delegito, S<sup>ro</sup>. M. Espar kaj Boquer, ekmalfermis kurson de Esperanto. La lernantoj estas dek, kaj ili seninterrompe

ĉeestas aŭskulti la instruadon de nia fervora samideano, kiu celas kunhelpita de la federaciano S<sup>ro</sup>. P. Pallàs esperantistigi baldaŭe la tutan urbon.

Kuraĝo ne manku al vi, kaj vi prosperu en viaj proponoj! La kunhelpo nian vi ne devos peti du fojojn, kaj ni ĝojigos grandege ke viaj klopodoj estu fruktodonaĵoj por la bono de niaj celoj!

Nur la entuziasmoj sukcesas! Estu entuziasmaj kaj sindonaj!



## EKSTERLANDA MOVADO

Nun la eksterlanda movado estas tre rimarkinda, ĉar krom la ĉefa fakto kiu okazos dum la venonta Majo en Bruselo, kun okazo de la Mondkongreso de la Internaciaj Asocioj en kiu estos sendube prezentata Esperanton kiel internacia lingvo atingante ĝi grandan sukceson, oni povas rimarkigi, ne nur la disvastiĝado en ĉiuj landoj — laŭ la naciaj gazetoj — sed ankaŭ la eldonado de verkoj — originalaj aŭ tradukitaj — konkursoj diversaj organizitaj per niaj specialaj gazetoj, ekz, la organizita de «Juna Esperantisto» al kiu oni devas doni solvojn al la sekvantaj demandoj. «Pensu estas arto, revu estas *metio*». «Deziru estas la feliĉo, kio estas *menuo* al festeno». «La artisto mallaciĝas sed *neniam* ripozas», pruvante ĉio tio, ke nia afero antaŭeniras rapide al la efectiveco.



## BIBLIOGRAFIO

«Sub tiu ĉi rubriko oni pritraktos la esperantajn verkaĵojn librojn kaj eldonaĵojn kies la Redakcio estos ricevinta du ekzemplerojn.»



## OFICIALA PARTO

La Junta Directiva de la «K. E. F.» ha quedat constituída provisionalment, fins a la celebració de la primera assamblea, la qual tindrà lloc durant els dies 15 i 16 de Maig prop-venient, baix la següent forma:

*President*, Sr. J. M. Terricabras (Vich). — *Vic-president*, Sr. A. Badia (Terrassa). — *Secretari*, Sr. J. Bta. Albiñana (Barcelona). — *Caixer-administrador*, Sr. Joan Piferrer (Sabadell). — *Vic-caixer-administrador*, Sr. Pere Ustrell (Sabadell).

Aquesta Junta prega a totes les societats esperantistes que per oblit no se'ls hagi enviat la circular notificant-los la constitució de «K. E. F.», que ho dispensin, puix per manca d'una verdadera llista, molt fàcilment se pot incorrer en lamentables omissions, les quals sempre són de doldrer.

L'Administració prega a tots els senyors socis que no han pagat totalment la cuota anyal, ho facin a la brevetat possible, per el major ordre de l'Administració, i a la vegada per a donar compliment a l'article quart del reglament, puix s'ha d'entendre que no es la subscripció a la revista lo que's paga, sinó la quota de soci.

Tots els grups esperantistes de Catalunya que no hagin rebut o desitgin rebre més *aligiloj* i fulles de propaganda, contenint aquestes l'allocució i reglament de la «K. E. F.», poden demanar-ne an aquesta Redacció. Se prega que dits impresos siguin profusament repartits entre 'ls membres de cada grup sens distinció.

Pels estatuts per que's regeix la «K. E. F.», queda entès que'ls socis de cada localitat han d'eleger un representant per majoria d'ells. Per lo que fa referencia a Barcelona, la Junta Provisional ha disposat que l'interior de Barcelona, o sigui casc antic i aixamplis, se consideri com una localitat, i tots els pobles agregats (Gracia, Sant Martí, Poble Nou, etc.) també, havent d'eleger altres tants delegats respectius.

Fins avui, a les llistes de socis de la «K. E. F.», hi figuren esperantistes de les següents poblacions:

Reus, Vilanova i Geltrú, Sabadell, Vich, Barbarà del Vallès, Balaguer, Cambrils, Olot, Terrassa, Manlleu, Barcelona, Tarragona, Premià de Mar, Tivissa i Castellar del Vallès; i adherits, els grups «Vika Esperantistaro», «Esperanta Nesto», «Esperanta Semo», «Lumon» i «Tarragono Esperanta».

Segons l'article setè del reglament, en el proper congrés o assemblea de la «K. E. F.» que tindrà lloch a Sabadell durant els dies 15 i 16 de Maig, s'hauran d'eleger els individus per a formar el Comitè definitiu per a 1910-11, donar compte dels delegats elegits per a cada població respectivament, presentar les finances per a llur aprovació, designar la localitat per a la vinenta assemblea, i, finalment, discutir les proposicions presentades pels senyors socis, les quals poden esser enviades an aquesta Redacció fins al dia 20 del corrent mes, a fi i efecte de poder-les publicar en el prop-vinent número.